James Krüss,

Enlitiĝi devas vi

tradukita de Manfred Retzlaff

Enlitiĝi devas vi,
ĉar jam la malhelo
de l' vespero ĉirkaŭ ni
nun ekregas ĉie ĉi,
lumas hela stelo.

Dormos baldaŭ jam la sun'
en la nigra spaco.
Kaj la viro sur la lun'
iras en la liton nun
pro treega laco.

La paseroj de l' tegment'
iris en la nestojn.
Sin kuŝigis eĉ la vent',
nur la kat' en la silent'
ĉasas nokte bestojn.

Ĉar fariĝis nun vesper'
ĉiuj sin kaŝigas.
Sed kelkiun la mizer',
la doloro kaj sufer'
tute maldormigas.

Traduko de la Germana poemo "Hanselmann muss schlafen gehn" de James Krüss *(Jakobo Krujso, ∗1926-05.31 – †1997-08.02) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1983.*

MR-082-1 / Arg-669-1344 (2012-11-21 19:37:30)